

A  
p  
r  
i  
l  
o



# La cirkulero

2015



92

**CENTRE CULTUREL ESPERANTO TOURAINE**  
Maison des Associations, Halles de Tours  
Place Gaston Paillhou  
37000 TOURS  
02-47-55-20-10 ou 02-47-20-43-95

[esperanto-touraine37@wanadoo.fr](mailto:esperanto-touraine37@wanadoo.fr)

<http://esperanto-tours.ls.fr>

Prezidanto  
Vicprezidantoj

Dominique Baron, 15, impasse Marat, 37700 SAINT PIERRE DES C. ; 02 47 44 62 12

Juanita Turbillon, 4, jardin Ockeghem, 37000 TOURS ; 02 47 20 43 95

Pierrette Formen, 52, rue de l'Aubertière, 37510 SAINT GENOUPH ; 02 47 45 51 58

Kasisto

Hélène Alessandri, 3, rue des Richardières, 37230 LUYNES

Sekretario

Jacques Gaumé, 6, imp. des Primevères, 37390 CHANCEAUX S/CH. ; 02 47 55 20 10

## KIO OKAZIS ĴUSE ?

**Vendredon, la 20an de Marto**, Jean-Louis Le Brizault kaj Jacques Gaumé partoprenis en la festivalo de la lingvoj organizita de Linguafest'37 en la liceo Grandmont. Ili prezentis la lingvon Esperanto antaŭ 16 lernantoj kaj ilia profesoro de angla lingvo.



## QUE S'EST-IL PASSÉ RECEMMENT ?

**Vendredi 20 mars**, Jean-Louis Le Brizault et Jacques Gaumé ont participé au festival des langues, organisé par Linguafest'37 au lycée de Grandmont. Ils ont présenté la langue Espéranto devant 16 élèves et leur professeur d'anglais.

**Sabaton, la 21an de Marto** : En Les Halles de Tours okazis monata kunveno.

La saman tagon en **Angers** okazis renkonto por kanti la kantojn, kiujn la Kompanoj kantas en Lille.

Fabrice Morandeaŭ akompanata de sia akordiono kantigis la partoprenantojn.

5 turanĝianoj partoprenis :

Jane Pinon, Denise kaj J-L Le Brizault, Marie-France kaj J. Gaumé.

**Samedi 21 mars** : Aux Halles de Tours eut lieu la réunion mensuelle.

Le même jour à **Angers** eut lieu une rencontre pour chanter les chants que "La Kompanoj" chanteront à Lille. Fabrice Morandeaŭ, accompagné de son accordéon fit chanter les participants.

5 tourangeaux ont participé :



## VENONTAJ GRAVAJ DATOJ

Sabaton, la 18an de Aprilo, salono 120, je la 14a30,  
Christian Rivière prelegos pri :

**Etude comparative du temps des verbes en français et en espéranto (temps absolu, direct, indirect...).**

En collaboration avec Janine Dumoulin, espérantiste de Bouresse, Christian Rivière vient d'achever la traduction d'un livre de Delphine de Vigan et 60 extraits du livres servent d'exemple..

*"Kompreneble tute ne devige, sed mi opinias ke estas utile (faciligas la komprenon) antaŭe legi ĉu la franclingvan version de la romano de Delphine de Vigan "Les heures souterraines" (nun ĝi ekzistas poŝformate) ĉu la esperantlingvan version "La horoj subteraj". Ĉiuj ekzemploj (60 entute) de la dokumento estas eltiraĵoj el tiu verko."*

Sabaton, la 30an de Majo, salono 120 : Kantoj kun  
Fabrice Morandau. Horoj konfirmotaj.

(mi mendis al la urbodomo modifon de la jam konsentita rezervado por havi la salonon ekde la 9a30, mi ne havas ankoraŭ la respondon. Tio ebligus komenci cirkaŭ la 10a kaj tagmanĝi piknikon surloke ĉar ni invitas la esperantistojn de la najbaraj grupoj).

## PROCHAINES DATES IMPORTANTES

Samedi 18 avril, salle 120, à 14h30, Christian  
Rivière fera une conférence sur :

Samedi 30 mai, salle 120 : Chants avec Fabrice  
Morandau. Heures à confirmer.

(j'ai demandé à la mairie de modifier la réservation déjà acceptée pour avoir la salle à partir de 9h30, je n'ai pas encore la réponse. Cela permettrait de commencer vers 10h et de pique-niquer sur place car nous invitons les espérantistes des groupes voisins).

"Kanti estas socia ago. Longe kantoj akompanis la evoluojn de la socia vivo. Homoj kutimis kanti jen sole, jen familie, jen grupe. Ĉu hejme, ĉu surstrate, ĉu laboreje, ne gravis la loko. Okaze de festo, de ceremonio, de funebro, kanzonoj ritmis ĉies emociojn.

**La kanzonoj okupis gravan rolon ankaŭ en la esperanta kulturo.** Tuj de la komenco la internacia lingvo pruvis sian poeziecon ankaŭ dank'al kantoj. Dum la gloraj horoj de la movado, abundis la eldonitaj kantaroj kun jen tradukitaj, jen originalaj tekstoj kaj muzikoj, kaj esperantistoj ne maltrafis okazojn por kunkanti. Fine de la 20a kaj en tiu komenco de la 21a jarcentoj tro rapide perdiĝas tiu kutimo.

**La Kompanoj** bedaŭras tion konstati. Instige al reveko de entuziasmiga simpla arto, jen do propono de repertuaro por surstrate kunkanti. Prepare al la **100a UK en Lillo, La Kompanoj** elektis tradukojn de famaj franclingvaj kanzonoj. Malkaŝita celo estas disdoni tekstojn al pasantoj, kiuj rekonos la melodiojn kaj estos invititaj kunkanti en esperanto, kvankam tute fremdaj al la lingvo.

La Lillaj kongresontoj estas invitataj ekprepari sin por gvidi la surlokan publikon per ĉi reteje, facile elŝuteblaj tekstoj, partituroj, kaj muzikoj.

**Tiu granda publika kunkantado okazos lundon la 27an de julio posttagmeze sur la Operejo Placo, urbocentre de Lillo."**

## Maison Culturelle de l'Espéranto au château de Grésillon

Mi atentigas vin : printempo jam komenciĝis!

Ne prokrastu vian aliĝon al la studperiodo kiu permesas al vi lerni efike Esperanton, kaj prepari vin por interŝanĝi kontentige kun la multaj eksterlandanoj kiuj vi renkontos en Lille somere.

Ni provos trejni vin por diskuti, debati, ktp... por ĝui plene Universalan Kongreson.

Eĉ se vi ne intencas partopreni UKon, vi certe volos uzi Esperanton dum internacia renkontiĝo ĉu ne?

Vizitu nian retpaĝon

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique20&lang=eo>

kaj aliĝu aŭ por la studperiodo aŭ por la ekzameno KER.

Kore

Jannick Huet

Maison Culturelle de l'Espéranto

Château de Grésillon

St. Martin d'Arcé

49150 BAUGÉ-EN-ANJOU

Téléphone: 02.41.89.10.34

Courriel: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

Vous apprenez l'Espéranto et vous voulez faire de gros progrès en une semaine

Attention, le printemps est déjà là et bientôt aura lieu PRINTEMPaS.

Ne tardez pas (les habitués de la procrastination!) à vous inscrire au stage qui vous permet d'apprendre l'Espéranto de façon efficace et vous préparer à une communication satisfaisante avec les nombreux espérantophones étrangers que vous rencontrerez peut-être à Lille cet été.

Nous essaierons de vous entraîner à la discussion, au débat etc... pour savourer pleinement le Congrès Universel 2015.

Même si vous ne participerez pas au congrès, vous voudrez certainement utiliser votre Espéranto pendant des rencontres internationales, n'est-ce-pas?

Rendez-vous sur notre page internet

<http://gresillon.org/spip.php?rubrique20&lang=fr>

et inscrivez-vous pour le stage de cours intensif et/ou pour l'examen du cadre européen de référence de votre niveau.